MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

INFORMILO 7-8

Julio - Aŭgusto 2016 Kol. 375-376/32

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Enhavo: E-tago en Pardubice, Heroldo de Esperanto, Fervojistoj en Varna, Unu mondo-lingvo-mono, Ĉiam mi volis helpi, Kribrilo, Butona kasteleto, Feriado en Duszniki Zdroj, Skokovy, El la redakcio

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

La 19-a Esperanto-tago (4. 6. 2016)

La unuan junian sabaton, en kastel-kafejo en Pardubice, renkontiĝis 45 esperantistoj kun siaj familianoj kaj kelkaj konatoj. Post nelongedaŭra jarkunsido, ĉe kiu estis traktita la nepra ŝanĝo (preskribita de la leĝo – konkrete ni nun havas statuton kiel „enskribita societo“), ni informis la partoprenantojn pri la plano kaj plua agado de AEH kaj de E-klubo.

La plej grava nunjara aranĝo estas partopreno en la 101-a UK en Nitra, Slovakio.

Por la venonta jaro ni preparas la 8-an kongreson de AEH kaj lingvan seminarion en la Kasteleto Hodonín ĉe Kunštát en la dato inter 21-a ĝis – 27-a de aprilo 2017.

Nian renkontiĝon pliriĉigis sinjorino Stáňa Hošková el Dobříš, kiu sin prezentis (en la ĉeĥa) kiel Elizabeto Pomorania - la kvara edzino

de la ĉeĥa reĝo kaj romio-germana imperiestro Karolo la Kvara. En unuhora monologo ŝi dramoforme rakontis pri sia kunvivaĵo kun tiu grandulo, kiu estis por ambaŭ feliĉa malgraŭ 35jara aĝodiferenco inter ili.

Se oni havus eblon en la lernejo per simila stilo lerni historion, certe oni povus pli bone memori ĝin. La sinjorino Stáňa post sia prezentado estis „superŝutita“ per nia arda aplaŭdo kaj ni estas dankemaj por la okazo de bela kultura travivaĵo.

Post la tagmanĝo Margit Turková ankoraŭ konatigis nin pri aliaj interesaĵoj el la vivo de Karolo la Kvara, kaj poste jam venis tempo por informoj el diversaj kluboj, kiujn ni aŭskultis de la partoprenantoj. Kafo kaj desertoj helpis al kontentiga bonhumoro.

Ĉar ankaŭ la vetero estis agrabla, ni promenis antaŭ fino de la renkontiĝo sur la kastelaj remparoj. Pri ilia historio nin informis Pavel Nechvíle.

Nia renkontiĝo pasis nur en la ĉeĥa lingvo, pro partopreno de neesperantista publikaro ĉe la teatraĵo, ĉar ni volis montri, ke Esperanto estas ne nur nia interna komunikilo, sed povas ankaŭ servi kiel peranto de kulturaj valoroj. Laŭ la reagoj de partoprenintoj ni esperas, ke ĉiuj revenis hejmen kontentaj kaj ke ankaŭ la mielkukoj el Pardubice estis bongusta al ĉiuj.

La foto montras reston de partoprenintoj, kiuj ne devis rapidi al trajnoj aŭ busoj.

L. Angelová, Margit Turková
Fotoj . L Chaloupková, J. Hron, P. Nechvíle

HEROLDO DE ESPERANTO

estas aĉetita kaj renaskiĝos denove de la jaro 2017.

„Heroldo de Esperanto“ estas unu el la plej malnovaj E-gazetoj. Dum la lastaj jaroj ĉe la nuna eldonanto ĝi ofte malfruis, havis multajn problemojn – sed nun aperis espero pri ĝia revigliĝo.

Fabricio Valle (la antaŭa redaktoro de la revuo Esperanto) kaj Paulo Lima, partneroj en la entrepreno Sociala Grupo Lexus“ en Brazilio, aĉetis la gazeton „Heroldo de Esperanto“ kaj eldonos ĝin ekde la jarkolekto 2017.

HEROLDO DE ESPERANTO

LA PLEJ OFTA INTERNACIA GAZETO DE LA ESPERANTO-MOVADO

N-ro 16 (1787) FONDITA EN 1920 — 63-a JARKOLEKTO

La domo de Zilbernik

Ĉinaj kuracistoj en Pollando

La ĝisnuna eldonanto Kooperativo de Literatura Foiro (membro de la pakto de G. Silfer) respondecas ankoraŭ pri la tuta jarkolekto 2016. La vendo ne koncernas la rajtojn pri la libroj: la rajtoj restas ĉe LF-koop kaj IIC.

Informoj pri la planoj de Lexus rilate la gazeton, fonditan de Teo Jung, aperos regule ĉe la Facebook-paĝo de la nova eldononto: https://www.facebook.com/lexussociala/ L.S.

Fervojistoj kongresis en Varna

La 68-a IFEF kongreso nun en la bulgara urbo Varna okazis de la 21-a ĝis la 28-a de majo 2016 en Oraj sabloj, la ripozloko „Sanktaj Konstantin kaj Elena“, (pli frue DRUŽBA). Aliĝis 92 partoprenantoj el 12 landoj. La ĉeĥa kolektivo konsistis el 11 personoj kaj ĝi fariĝis la plej granda kongresa grupo el fremdaj landoj. Solena inaŭguro komenciĝis en salono de la hotelo Frederiko Ĵulio Kjuri.

Laŭ malnova bulgara kutimo ni estis bonvenigitaj per pano kun salo kaj krome ankaŭ per „guto“ da brando en originalaj ceramikaj ujetoj kun Esperanta surskribo, faritaj speciale por la kongreso. Vere ĉiuj ni estis agrable surprizitaj!

Post Esperanta himno Petja Aleksandrova bonvenigis ĉiujn partoprenantojn, ankaŭ gravajn gastojn el Trajntrafiko kaj E-Asocio kaj komitaton de IFEF. Post salutoj de honoraj gastoj venis tempo por landaj reprezentantoj. Nome de la ĉeĥa grupo salutis la kongreson Jana Křížková. Martin Stuppnig, aŭstria partoprenanto, aldonis al la salutoj informon pri la ĵus eldonita libro „ Home en senhomeco“. En ĝi li rememoras siajn personajn travivaĵojn dum la 2-a mondmilito.

Varmege alparolis nin la prezidantino de IFEF Rodica Todor kaj deklaris la kongreson inaŭgurita. Ŝi transdonis Honorajn diplomojn de IFEF al elektitaj meritplenaj esperantistoj. Inter ili estis ankaŭ la ĉeĥo Jindřich Tomíšek, kiu ricevis grandan aplaŭdon!

Sekvis komuna fotado kaj plantado de diverskoloraj rozoj. Por Ĉeĥio plantis unu rozon la ĵus honorigita delegito J. Tomíšek.

Dum la nacia vespero kantis diversaj kantistoj kaj dancis folklora grupo. En alia vespero okazis kvizo, kiu precize respondis, ricevis premion. La 24-an de majo okazadas en Bulgario Nacia festo omaĝe al la sanktaj viroj Konstanteno kaj Metodio. Ni komune vizitis la urbon Varna kaj spektis duhoran solenan marŝon, kiu tre similis al nia iama festo la 1-an de majo. Aŭdeblis muziko, marŝis infanoj kun diversaj ornamaĵoj, maristoj en belaj uniformoj, gejunuloj portis bildojn de Konstanteno kaj Metodio, civitanoj svingis florojn, ĉiuj estis gajaj kaj ridemaj.

Ĉe la kunsidoj parolis Wang Lihua kaj Zhang Hongwei pri analizoj de fervojaj transportaj trafikigoj en Ĉinio, s-ano Matuška pri historio

de fervojkonektoj de iama ČSR / nun Ĉeĥa respubliko/ kaj Eŭropo, s-ano Kovář pri diagnostiko de ruliĝantaj vagonoj.
Vito Tornillo montris per bildoj, kiel aspektas stacidomoj aŭ diversaj stacimuroj en Italio „desegnitaj“ per „sprajaj fakuloj“… En la diskuto prelegantoj respondis multajn demandojn pri ĉiuj temoj.

Estis starigita faka programo por fervojistaj prelegoj ĉe la 101-a UK en Nitra. Ankaŭ oni diskutis pri diversaj proponoj de fakaj fervojistaj terminoj kaj estis rekomendite daŭrigi tion en bultenoj sub titolo „El fervoja mondo“ kaj „Fervojfakaj kajeroj“.

Ĉe la plenkunsido Rodica Todor proponis, kiel vigligi Esperanto-agadon inter fervojistoj kaj la ĉeestantoj multe diskutis pri tiu ĉi temo! Ni vidos, ĉu ĝi sukcesos.

Dum nia libera tempo ni vizitadis la urbon, en butikbudoj ni aĉetadis suvenirojn. Ankaŭ ni iomete sunbruniĝis sur la plaĝo kaj multaj banis sin en la maro. Nekuraĝuloj uzis hotelan basenon kun varma minerala akvo. En tipaj bulgaraj restoracioj ni gustumis landajn specialaĵojn kaj trinkis bongustajn vinojn.

Tuttaga ekskurso okazis al unu el la rokaj monaĥejoj Aladĵa. Plue al la palaco-komplekso en Balĉik, vilaoj kaj al botanika ĝardeno en parko. Ni vizitis ankaŭ la plej longan kabon de balkana insulo kun la nomo „Kabo de Kaliakra“.

Duontagaj ekskursoj gvidis nin al la katedralo „Sankta Dipatrino“ en Varna, dua la plej granda en Bulgario kaj al Nesebar. La antikva malnova urbo Nesebar estas en la listo de Unesko kiel monda kultura heredaĵo. En ĝi estas videblaj multaj preĝejoj, malnovaj dometoj kaj vento-muelo. Ĉe la lasta kunsido bulgaroj transdonis la Esperantan flagon al la francoj, kiuj organizos la venontan IFEF kongreson en Colmar.

Por aranĝi la 70-an kongreson aliĝis Pollando. Post la adiaŭo kelkaj el ni forveturis al la postkongreso en Veliko Tarnovo, aliaj hejmen.
Ni travivis interesajn tagojn plenajn de la amikeco kaj neniu el ni forgesos, ke la reloj ligas la landojn, Esperanto la popolojn!

Fotoj de L.Vignaud, teksto de J. Křížková.

Unu mondo - unu lingvo - unu mono

Universala Ligo – kvar moneroj (steloj) en mia kolekto
(eldonis Universala Ligo, nun UEA, Rotterdam, Nederlando)

Kiel esperantisto mi interesiĝas ankaŭ pri historio kaj pri historiaj helpsciencoj. Inter ili apartenas eĉ historio de moneroj - numismatiko.

← kupro →

En la 80-aj jaroj de la pasinta jarcento mi legis artikolon en la gazeto „Heroldo de Esperanto“, kiu estis por mi tre interesa. La aŭtoro skribis en ĝi pri E-monsistemo, kiun en la jaro 1950 nove fondis iama Universala Ligo (nuna UEA). Temis pri memstara tutmonda monsistemo ne nur por internaciaj Esperantaj institucioj, naciaj, E-asocioj, E-kluboj, sed ankaŭ por unuopaj esperantistoj.

Oni atendis, ke same kiel Esperanto je la lingva nivelo, ankaŭ la nova monsistemo kontribuos al plisimpligo de la merkatoj kaj ceteraj financaj transkondukoj inter tutmondaj internaciaj kaj naciaj E-asocioj.

← *bronzo* →

Mon-unuo de la nova monsistemo estis „stelo“. Unu stelo prezentis unu kilogramon da pano, sed praktike unu stelo fakte respondis al 0,25 nederlanda guldeno.

En la supre menciita jaro estis eldonitaj stel-pagbiletoj (stel-kuponoj) po 1 stelo, 5 steloj kaj 10 steloj presitaj sur blanka papero en la koloroj verda, ruĝa kaj helbruna. Bedaŭrinde mi trovis ilin nenie, ke mi almenaŭ vidu kaj ankaŭ prezentu por vi, kiel ili aspektas.

← *niklo* →

Universala Ligo (UL) decidis en la jaro 1959, okaze de la 100-jara naskiĝjubileo de L. L. Zamenhof, cirkuligi la monerojn po 1, 5 kaj 10 steloj, stampitaj en nederlanda ŝtata monerfarejo en kvanto po 10 mil pecoj de ĉiu nominalo. Ĝia tiama direktoro d-ro Hengel transdonis ilin oficiale al estraranoj de UL en junio de 1960.

La artproponojn de la moneroj preparis la tiama vicprezidanto de UL s-ano Andreo Czech (kies pragepatroj devenis el la banurbo Bohda-

neč, proksime de Pardubice). Gravuristo de la stampiloj por stampi monerojn ne estas por mi konata. En 1965 estis stampita eĉ la 25-stelmonero en oro – nur 10 pecoj kaj la sama nominalo en arĝento, sed ĝia kvanto ne estas konata.
La moneroj estis libere haveblaj por centoj da esperantistoj dum Universala kongreso de Esperanto en Nederlando en 1960.

←*arĝento* →

Ĉi tiu monsistemo en Esperantujo bedaŭrinde ne sukcesis. La nuna UEA disvendadis la monerojn dum la 90-aj jaroj al interesatoj nur kiel suvenirojn. Unu kompleto da moneroj (sen la ora nominalo de 25 steloj) kostis 60 tiamajn germanajn markojn. Por numismatikistoj, sed laŭ mia opinio eĉ por la esperantistoj, la E-moneroj estas interesaj kaj prezentas malgrandan numismatikan raraĵon. Ke vi almenaŭ vidu, kiel aspektas kolekto da moneroj, kiu estas en mia kolekto, mi aldonis al ĉi tiu teksto jenan bildprezentaĵon. Joĉjo Kruco - ijk

Ĉiam mi volis helpi al homoj

En sia 15-a jaraĝo li blindiĝis. Sed li ne restis hejme, li ne volis, ke homoj bedaŭru lin. Nun li laboras kiel masaĝisto en integra centro de socialaj aktivaĵoj Kosatec en Pardubice. Mi skribas pri la 27-jara knabo Milan.
„Kiam mi blindiĝis, mi cerbumis, kion mi povos fari. Mia celo ĉiam estis helpi al homoj. Laŭ la informo, ke mi povus esti masaĝisto, mi provis tion kaj jam tie mi laboras sepan jaron danke al projekto, kiu nomiĝas: Subteno de labor-validigo por la personoj kun okulhandikapo en regiono Pardubice, kiu estis kunfinancita de Eŭropa sociala fondo kaj ŝtatbuĝeto de Ĉeĥa respubliko“, handikapo en regiono Par-

dubice, kiu estis kunfinancita de Eŭropa sociala fondo kaj ŝtatbuĝeto de Ĉeĥa respubliko“.
Kontraŭ ceteraj blindaj homoj havas Milan avantaĝon en tio, ke li iam estis vidanta. Li diris: Mi scipovas imagi, kie estas fenestro, pordo ktp.

Pri la demando, ĉu la blindaj masaĝistoj estas pli bonaj ol la vidantaj, devas respondi tiuj, kiuj estis masaĝitaj de ambaŭ. De lia sperto la homoj – ĉefe virinoj — pli volonte elektos la blindan, ke oni ne vidu ekzemple ilian iom dikan figuron.
Ĉe sia laboro Milan ofte renkontas la homojn suferantajn pro dorsodoloroj. Ili estas ofte kaŭzitaj de senĉesa sidad-okupo. Kiam la homoj revenas el sia laboro, estus necese ne tuj denove eksidi al la televido aŭ komputilo, sed unue iomete gimnastiki aŭ sporti.
Kiam Milan studis, li konkursis en atletiko, hodiaŭ de tempo al tempo almenaŭ veturas sur rulglitiloj.

El la ĵurnalo tradukis J.Rýznarová

Kribriloj de Sokrates

Iam renkontis Atenano la filozofon Sokraton kaj diris al li: „Ĉu vi scias, Sokrato, kion mi ĝuste eksciis pri via amiko?“ „Atendu momenton,“ respondis Sokrato. „Antaŭ ol vi ion ajn diros al mi, mi deziras submeti vin al ekzameno. Oni alnomas ĝin ekzameno de tri kribriloj.“



„Ĉu tri kribriloj?“
„Jes,“ daŭrigis Sokrato. „Antaŭ ol vi diros al mi ion pri mia amiko, eble estos bone ĉimomente kribri tion, kion vi diros. La unua kribrilo nomiĝas vero. Ĉu vi precize scias, ke tio, kion vi volas diri, estas certe vero?“ „Ne," respondis tiu viro, „mi nur aŭdis tion kaj ...“ „Bone,“ diris Sokrato. „Do vi ne scias, ĉu tio estas vero aŭ ne. Nun ni provu la duan kribrilon. Tiu ĉi kribrilo no-

miĝas bono. Ĉu vi volas diri al mi pri mia amiko ion bonan?“ „Ne, male...“
„Do,“ daŭrigis Sokrato, „vi volas diri al mi pri li ion malbonan kaj vi ne estas certa, ĉu tio estas vero. Hm, hm, sed ankoraŭ vi povas sukcesi en ekzameno, ĉar restas ankoraŭ unu kribrilo. Ĝi nomiĝas utileco. Ĉu tio, kion vi volas diri al mi pri mia amiko, estas utila?“ „No, ne tro...“
„Bone,“ fermis Sokrato, „sekve de tio, ke kion vi volas diri al mi, estas nek veraĵo, nek bona, eĉ ne estas utila por mi. Do, kial vi rakontu tion al mi?“

=====

Al mi tre plaĉas tiuj kribliloj kaj mi volus aldoni vortojn de la ĉeĥa verkisto Karel Čapek: Imagu tiun silenton, se homoj diradus nur tion, kion ili scias....

El la interreto tradukis Ludmila Srbová

Butona kasteleto

La nova kastelo en Rudoltice ĉe Lanškroun, nomata „Kasteleto“ estas nur torzo de la belega kaj vasta kastelo, kiun konstruigis antaŭ 300 jaroj la gento de Lichtenŝtejn. Ĝi troviĝas en ĉarma angulo de Orienta Bohemio. La kastelo jam ne aspektas bele; rekonstruo ne okazis, elektro kaj akvo ne estas tie, tamen ĝi de tiu ĉi jarkomenco estis multe vizitata kaj la vizitantoj estis kontentaj.

Kion la kasteleto povas oferti? En la unua etaĝo troviĝas diversaj ekspozicioj, kiel ekzemple interesa dratista ekspozicio, kie estis taksita kvar tavola ovo kiel ĉeĥa rekordo.

La plej plaĉa por infanoj eĉ por plenkreskuloj estas la unika butona kolekto. Ĉe la antaŭlasta kalkulado tie troviĝis pli ol 750 kilogramoj da plej diversaj butonoj, el kiuj estas ellaboritaj bestetoj, koroj, butona ĉapelo, infana ĉareto, la tuta estas surgluita per butonoj, ktp.

Ne nur la ĉeĥan rekordon, sed ankaŭ mond-rekordon ricevis la speciala surmetaĵo, pri kiu laboris pli ol 700 homoj. La butonojn kolektas kaj alportadas senĉese multaj homoj el la proksimeco eĉ el foreco.

La afabla gvidantino de la kasteleto skribis antaŭ kelkaj monatoj: Neatendite ni jam estas „butonaj“ milionuloj, kiel mi tion konstatis ankoraŭ en noktaj horoj. Post la kvinjara kolektado estas ĉi tie 1 100 000 butonoj. Tiu nombro estis agnoskita kiel plua rekordo.

La duan rekordon ricevis drata koro el la plej granda nombro de maŝoj. La koro estas granda 51 x 55 cm, el 1370 maŝoj, ĝi pezas 0,85 kilogramojn.

premio

Kaj la trian ĉeĥan rekordon akiris la giganta butona koro el 500 000 butonoj. Ĝi estas larĝa 4,65metrojn kaj longas 7,60metrojn. Ĝin helpis ellabori 108 homoj. Por butonaj konkursoj estas ellaboritaj belaj bestetoj, grandaj papilioj, pavo, la oldaj homoj el la pensiono elkreis altan arbon, ornamitan pere de koretoj, kvarfolietoj ktp.

Kiam la redaktoro demandis, kiu ricevos gajnitan monon, la gvidantino respondis, ke dum tiuj 5 jaroj oni jam ricevis el tiu ĉi karitata agado pli ol 470 000,- Kč kaj tiel helpas al paraliziĝintaj infanoj kaj al aliaj handikapitaj homoj. Ili ĝojas, ke ankaŭ la estraro de la urbeto ofte ilin finance subtenas.

Tradukis Jarmila Rýznarová

Invito al feriado en Duszniki Zdroj

Tereza Pomorska invitas nin – jen ŝia letero:
Karaj geamikoj, multaj el vi konsideras, ĉu ĉijare okazos nia kutima feriado. Mi fakte malsanis de iom da tempo, sed mi preparas ĉion, ke ni povu renkontiĝi ĉi-septembre.

Mi trovis novan lokon — ĝi estas iom malpli luksa ol la hotelo de Esperanto, tamen pli malmultekosta kaj pro tio ĉiuj partoprenontoj povos loĝi komune. Mi mendis por nia grupo gastĉambrojn en franciskana klostro en Duszniki Zdrój. Ili estas modestaj, sed agrablaj kun lignaj novaj mebloj, freŝe farbitaj.

Regas tie tre simpatia, familia etoso kaj mastrino de la domo, kuiras bongustan manĝaĵon. Najbare de la domo etendiĝas granda, belega ĝardeno.

Estas ankaŭ aparta dometo, kie troviĝas salono sufiĉa por niaj vesperaj komunaj renkontoj. En la domo plej multe plaĉis al mi la manĝejo. Mi pensas, ke tiu domo vere ekplaĉos al ĉiuj.

La feriado okazos en la tagoj 14-23 de septembro 2016, do estos eble tuj post ĝi veturi al Poznano, kie komenciĝos ARKONES. La prezo estas 740 zlotoj por ĉio - (manĝaĵo trifoje dum tago, kursoj, busa ekskurso al Ĉehio).

Ĉijare ni festos 110-an datrevenon de la unua restado en la kuracloko de Ludoviko Zamenhof. Venu kaj ni festu komune tiun solenaĵon. Rakontu pri la aranĝo al viaj geamikoj kaj invitu ilin. Vi povas transsendi la informon. Se iu el vi enkonduke decidos alveni kaj aliĝi, mi baldaŭ sendos aliĝilon. Kun tre sinceraj amikaj salutoj kaj kun espero de la renkontiĝo septembre.

Tereza Pomorska.

Vi povas rigardi la paĝon de fratoj franciskanoj ĉe la paĝo: http://duszniki.franciszkanie.com Klasztor Zakonu Braci Mniejszych (Franciszkanów) strato Podgórska 457-340 Duszniki Zdrój, Pollando

ATENTU: Ŝanĝo de la dato en Skokovy

La lingva seminario okazos de la 3-a ĝis la 9-a de oktobro 2016, do unu semajnon post la origine anoncita dato. Temas pri organiza afero. Ĉi tie estas la korektita invitilo. Dankon pro via kompreno. Jindřiška Drahotová telefono: 720 652 320.
Amika invito al la tradicia semajna seminario en Bohemia paradizo, en familia pensiono **Espero** en la vilaĝeto **Skokovy** – 75 km nordoriente de Prago – en puran naturon.

Venu inter nin: al la homoj sanaj, handikapitaj, junaj kaj maljunaj, kiuj ŝatas Esperanton kaj deziras ĝui belan naturon. Oni povas tie ekzerci korpon kaj spiriton, krei memoraĵojn kaj ion alian plu…babili, frandi, promeni, ekskursi, diskuti, ludi, eĉ lerni….
Senbara modesta medio, 2-5 litaj ĉambroj, prezo por kompleta servo je unu tago proksimume 420 Kč/tago (l eŭro 27 Kč). Necesejoj kaj

duŝejoj troveblas en koridoro. Interreta konekto uzeblas. Oni pagas surloke.

Kontaktoj: Jindřiška Drahotová, Sadová 745/36, Mladá Boleslav 293 01, Tel: 420 720 652 320 drahotovaesperanto@seznam.cz drahotova@esperanto.cz www.sweb.cz/espero.skokovy www.mlboleslav.cz/esperanto www. aeh@esperanto-aeh.eu www.evinatelier.cz www.esperanto.cz

El la redakcio:

Karaj legantoj, membroj, abonantoj de Informilo!

Certe Vi scias, ke la Ĉeĥa poŝto altigis (de la 1-a de majo 2016) poŝtpagojn por sendaĵoj ne nur en Ĉeĥa respubliko, sed ankaŭ eksterlanden. La Informilon ni sendadas al 130 esperantistoj pere de normala poŝto. Tiuj, kiuj forgesas pagi 200,-Kč, ricevas admonilon.

Al pluaj 35 adresoj ni sendas Informilon elektronike, sed pli ol duono de ili pagas nenion. Eble ili diras, ke kun forsendo ni ne havas ian laboron, ni ŝparas paperon, farbon por kopioaparato, poŝtmarkojn... Kompreneble nian laboron ni dediĉas al vi senpage multajn jarojn (pli ol 18 jarojn). Neniun grandan sponzoron ni havas.

Sur tiu ĉi loko ni volas vin peti almenaŭ pri duono de la sumo, kiun pagas abonantoj ĉe papera formo, t.e. 100,- Kč. Ankaŭ pluaj redakcioj tion simile solvas (vidu Starto) Estas tio subteno por AEH.

Devige ni sendadas nian malgrandan „gazeton“ al E-muzeoj kaj bibliotekoj, UEA, Nacia kaj regionaj bibliotekoj, ktp**. (Ni substreku, ke tio estas bona propag-maniero de nia agado!).**

Sciu, ke la elspezoj por Informilo (papero, farbo por kopioaparato, riparoj de komputilo kaj poŝtmarkoj) estas pli kaj pli kostaj. Ni ne scias, kiel longe ni povos eldonadi nian gazeton ĉiumonate, (aŭ ĉu ni ne devos altigi la abonon). Certe ni ĉagrenus tiujn membrojn, por kiuj

nia gazeto estas sola kontakto kun esperantistoj en la mondo, kiam ili jam ne povas vojaĝi. Akceptu mian antaŭdankon por Via kompreno.
Via redaktorino de Informilo Jarmila Rýznarová

Trista anonco:

Forlasis nin plua membro **Adolf Veselý** (*20.7.1928, †30.5.2016) el la urbo Brno. Li travivis aventuran junaĵon en Francio, sed post grava akcidento vivis ian tempon kiel senhejmulo. Poste zorgis pri li bonaj homoj kaj post la reveno en sian patrujon li kunveturigis francan edzinon, s-inon Anjon; ankaŭ li alportis reliefon de Lanti, kiun li dediĉis al E-muzeo en Svitavy. Li verkis la libron pri „La renkontiĝo kun Abbé Pierre“ S-ano Veselý estis entuziasma membro de SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda), kiun Lanti fondis ĉe ni en Prago dum la kongreso UEA en la jaro 1921. Honoron al lia memoro !

red.

INFORMILO – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj
Redaktoroj: J. Rýznarová, L. Srbová, J. Kosnar
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. **466 611 941** SKYPE : jary_esperanto
e-mail: **aeh@esperanto-aeh.eu** interreto: **www.esperanto-aeh.eu**
Bankovní spojení: Poštovní spořitelna, číslo účtu AEH **192150088**, kód banky **0300**
Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (nad vaší adresou) jako variabilní symbol!
Roční předplatné časopisu Informilo = 200,-Kč, příspěvek svazu dobrovolný.
La jarabono de Informilo 15 €. Kodo ĉe UEA: aehk-z
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.